

Leterkesto, 5-a parto
La kantlibro de Albert Lienhardt
Claude Gacond, 300-a radioprelego, 1969.07.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Aŭskultanto de niaj radio-prelegoj, sinjoro Albert Lienhardt en Mulhouse, Francio, informas nin pri unu el siaj laboroj.

A.- Ni diras unu, ĉar ni scias, ke tiu esperantisto estas ege aktiva.

Cl.- Sinjoro Albert Lienhardt nun finas la kompiladon de baldaŭ aperonta popola kantareto, kies titolo estas *Agordu la gitaron*.

A.- Por ke ni povu havi ideon pri lia laboro, sinjoro Lienhardt sendis al ni la provkopion de kelkaj kantoj, kiuj troviĝos en lia libro. Temas plej ofte pri amuzaj versoj inspiritaj de popolaj ŝerco-kantoj, kies melodioj estas tre konataj.

Cl.- En tiu kantareto mankas la notaro, sed tamen la melodioj estos indikitaj helpe de muzik-nota helpskribo, kiu estas facile legebla de instruitoj pri solfeĝo. En la apendico, do fine de tiu kant-libreto oni trovas detalan klarigon, kiu donas la ŝlosilon de tiu proponita muzik-skribo.

A.- Ekzemple antaŭ la paroloj de la kanto *Amikoj aŭskultu*, miks-kanto senfine daŭrigebla laŭ popola bavara melodio, ni trovas la ĉi-sekvajn not-indikojn :

Cl.- do / fa fa fa / la la la / fa fa fa / sol sol...

A.- Foliante la *Plenan Vortaron de Esperanto* de SAT ni ne trovis la tradukon de la not-sistemo uzata de Albert Lienhardt. Ŝajnas, ke la angla-germana sistemo bazita sur la literoj estis preferata de la esperantistoj ĝis nun, ĉar en la suplemento ni trovas la necesajn indikojn pri tiuj notoj.

Cl.- Sub C ni ekzemple legas : « *La tria litero de la esperanta alfabeto, uzata interalie kiel angla-germana nomo de la unua tono de la natura majora skalo, responda al la sono de 261 periodoj (franca-itala **do**)* ».

A.- Estus necese retrovi la saman klarigon sur la vorto **do**.

Cl.- Kio estas malagrabla en la alfabeto sistemo, tio estas, ke en esperanto la gamo fariĝas Co Do E Fo Go A Bo Co. Tio estas pli praktika por la skribado, ol por la kantado.

A.- Kontraŭe la itala sistemo estas pli praktika por la kantado, ol por la skribado. Do Re Mi Fa Sol La Si Do estas malpli monotona ol Co Do E Fo Go A Bo Co. La litera sistemo estas peza, dum la itala gamo estas pli eŭfonia.

Cl.- Pro tio ni estas kontentaj konstati, ke sinjoro Albert Lienhardt sin bazas sur la itala sistemo. Tamen ni instigas lin doni informojn pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de ambaŭ sistemoj kaj klarigi la kialon de tiu elekto.

A.- Nun ni ĵetu rigardon al kelkaj versoj de tiu kantareto. Ni konstatis, ke sinjoro Albert Lienhardt tre atentis, ke la esperanta akcentado respondu kun la muzika akcentado, kio ne estas ĉiam farita en la esperantaj kantoj.

Cl.- La kanto *Amikoj aŭskultu*, kies ritmo estas valsa povas doni ekzemplon:

A.- **A**mikoj aŭskultu, en **t**iu ĉi **r**ondo
 pri **s**trangaj aferoj en **t**iu ĉi **m**ondo !

Cl.- Por havi ideon pri la humuro de Albert Lienhardt ni legos al vi kelkajn tiajn strangajn aferojn:

A.- **A**damo kaj **E**va, **u**nua hom-**p**aro,

Leterkesto, 5-a parto
La kantlibro de Albert Lienhardt
Claude Gacond, 300-a radioprelego, 1969.07.09 & 12

praktikis nudismon dum **tuta** la **jaro**.

Cl.- Se **pluvas** aŭ **neĝas** dum **am**-rendevuo,
malfermu ombrelon sufiĉan por **duo** !

A.- Jen **bona** konsilo kaj **simpla** averto:
Ne **ronku** dormante dum **bela** koncerto!

Cl.- Jen **modo**-slogano, en **trafa** koncizo:
Fraŭlinoj, promenu en **mini**-ĉemizo !

A.- Hodiaŭ vi **trovas** en **ĉiu** ĵurnalo
konsilojn pri **murd'** aŭ **financa** skandalo...

Cl.- Jen **simpla** menuo, se **varma** klimato :
Usona porkaĵo kun **rusa** salato.

A.- Tiuj paroloj estas inspiritaj de bavara popolkanto. Oni sentas tiun humuron, kiu bezonas glason da biero por fariĝi gaja. Kaj ju pli la drinkado daŭras, des pli oni emas kanti, do 32 strofoj estas proponitaj, plus 33-a, kiu diras :

Cl.- Se **tiuj** strofetoj ne **plaĉas** al **vi**,
produktu pli **bonajn**, kaj **sendu** al **mi**!

A.- Sinjoro Albert Lienhardt, aŭ Bernard Thaillet, kiel li ŝatas sin kaŝnومي, ŝatas tiun iom pezan humuron de la vesperaj restadfajroj aŭ kabaredaj kunsidoj.

Cl.- La kanto *Pli bone estas* proponas 120 strofojn, kies dekdu unuaj estas de Raymond Schwartz, vidu la libron *La Ĝoja podio*.

A.- Pli bone estas manĝi
bifstekon kun buter',
ol nutri sin per amo,
promesoj, kaj esper' !

Cl.- Pli bone estas skribi
insultojn per kraĵon',
ol sendi komplimentojn
per kuglo de kanon' !

A.- Pli bone estas sidi
sur pajlo de karcer',
ol kuŝi en la ĉerko
du metrojn sub la ter' !

Cl.- Pli bone estas diri
stultaĵojn, kiel mi,
ol ronki sur fotelo
de la Akademi' !

A.- Al tiuj strofoj de Raymond Schwartz sekvas multaj aliaj. Iom tro multaj laŭ nia vidpunkto. Kaj ne ĉiam same spritaj. Jen kvar el ili°:

Cl.- Pli bone estas, saĝe
foresti dum debat',
ol iĝi cel-figuro
pro briko aŭ tomat' !

Leterkesto, 5-a parto
La kantlibro de Albert Lienhardt
Claude Gacond, 300-a radioprelego, 1969.07.09 & 12

A.- Pli bone estas frandi
nur pecon de perdrik',
ol – post tro multa manĝo –
sin tordi pro kolik' !

Cl.- Pli bone estas havi
sid-vangojn kiel lun',
ol kapon kiel piro
kaj nazon kiel prun'!

A.- Pli bone estas resti
en sia diocez',
ol en Francuj' ferii
kaj sakri pro la prez' !

Cl.- Al tiuj, kiuj riproĉos kiel ni la strofabundon, Albert Lienhardt respondas:

A.- Pli bone estas verki
ĉi tiajn strofojn cent,
ol ducent-paĝan libron
pri l' rekta komplement' !

Cl.- Fine je la centdudeka strofo, kiam ni vere laciĝis, kaj senpacienciĝas, venas la diro de Raymond Schwartz :

A.- Pli bone estas ĉesi
ĉi kanton antaŭ fin',
ol aŭdi la publikon
kriegi : « Fermu ĝin ! »

Cl.- Ni deziras al nia aŭdanto sukceson en la eldonado de tiu kantlibreto. Kaj se li permesas konsilon, ni diros, cent versoj estas vere tro, forstreku kvindek el ili. Same por ĉiuj ŝerckantoj. En tiu laboro la kvanto kaŝas tro ofte la kvaliton.

A.- Antaŭ ĉio nin interesas vidi la sukceson de la muziknota helpskribo, ĉar tie troviĝas la originala aspekto de la verko de Albert Lienhardt.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-